

EKO 2023



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



EKO 2023 / 54. Septembro 19, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 630 KB. Sume: KB 670

75

Kio estas la signifo de tiu nombro?
Malkovru tion en paĝoj tri kaj kvar!

Aŭtunas en Greziljono

AŬTUNAS de la 23-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro 2023:

- Eo-kursoj en kvar niveloj kun spertaj instruistoj: Renée Triolle, Szilva Szabolcs, Alain Delmotte, Maja Mériaux
- Ekzamensesio de Franca Esperanto-Instituto
- 12 prelegoj laŭ via elekto
- Origamio kun Larisa Osadčuk
- Programo por infanoj
- Folkloro Halovena festo laŭ loka maniero

Mult-aktivaĵoj de la 16-a ĝis la 22-a de oktobro 2023

- Ĥora (korusa) kantado en Esperanto de Interkant kun Bernard Bigonnet
- Esperantlingvaj promenoj piede kaj bicikle kun Olivier Buisson
- Enkonduko al Tango kun Tahar & Claudine
- Interŝanĝoj de scioj kaj faroj precipe franclingve
- Detaloj en <https://gresillon.org/koruso>; Aliĝo en <https://gresillon.org/aligho>

La franca Esperanto-kastelo de Greziljono apartenas al jam 255 esperantistoj kaj servas al ĉiuj esperantistoj. Venu al ĝiaj eventoj. Plusendu tiun mesaĝon al viaj Eo-amikoj. Iĝu societano. Helpu diversmaniere.

Bert Schumann

Virtuala kongreso de UEA en novembro

Tio okazos de la 23-a ĝis la 26-a de novembro. Eblas pri VK 4 legi en Eventa Servo: <https://eventaservo.org/e/VK4>. SMG ĵus aliĝis, por akiri informojn por EKO-komunikado.

Facila legaĵo pri vilaĝa literaturo kaj voĉdonado

<https://uea.facila.org/artikoloj/literaturo/en-mia-vila%C4%9Do-r384/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/kiu-rajtas-vo%C4%89doni-en-luksemburgo-r387/>

Kurso pri la sŭahila en Esperanto: prepare al Aruŝa

<https://suahilakurso.swahili.it/>

Aliĝu aŭ petu pli da informoj de Renato Corsetti.

Slovena kurso

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Ni kuras la duan rondon

Gvidantonomo: Osto Kristan (aldoninto)

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Ljubljana, Slovenio. (IJK 2024 okazos en Slovenio)

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27566>

Belartaj konkursoj – proza branĉo

Transdono de la premioj en la branĉo Prozo (UK en Torino)

<https://youtu.be/ck5AGkwpHhc>

mga

La sepdekkvina tuj alvenos

En la 5-a de oktobro, via EKO-komunikisto SMG iĝos 75-jara. Kun mia kutima kaj tumulta modesteco, mi permesis al mi dediĉi la lastajn du paĝojn al mia movada rolo kaj historio en bildoj.

===== vortoj: 500 =====

La kolekto de EKO por 2023:

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 50).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunajo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

Agad-fadenoj

Atinginte la aĝon de 75 jaroj, mi sentas deziron trovi ian fadenon en mia vivo-vojo.

AMO-programo

La programo provas trejni homojn, ke ili kontribuu pli produktive al la movado.

Ĝi instigas homojn esplori pli detale sian movadan situacion.

Ĝi pelas homojn el tio tiri rekomendojn el tio ĉerpi utilan agadon.

Tiu agado pluiru laŭ SMART-celoj. Bezonataj agoj estu asignitaj al konkretaj homoj kaj estu atingeblaj, reprodukteblaj kaj tempo-limigitaj.

KONKRETAJ ATINGOJ: 102 AMO-seminarioj depost 2014 en ĉiuj kvin kontinentoj.

EKO-komunikoj

Komuniki informojn pri landa kaj faka agado, regule kaj trafe.

La komunikoj estu ilustritaj kaj provizu retligojn. Ili rekonu indajn atingojn.

Tiuj komunikoj spronu la homojn al produktiva laboro.

La komunikoj estu tiom sveltaj, kiom eblaj, por ke ili atingu lokojn kun limigita komputika potenco. Egaleca komunikado; maksimuma atingo.

KONKRETAJ ATINGOJ: pli ol kvincent komunikoj tra la dek jaroj depost 2013.

Landa Parad'

Depost 2018, ĉiujara resumo de la stato de la landa kaj loka agado en ok regionoj.

Livero de valora analizo pri la stato de nia agado kun rekomendoj por estonteco.

En la jaro 2023 centoj da horoj da laboro devis esti forĵetitaj, pro la tro strikta interpreto de UEA pri la eŭropaj privatecaj reguloj.

Por 2024 ni agos forigi tiun malhelpon, por denove servi utile al la movado.

KONKRETAJ ATINGOJ: Depost 2015 de GAMO, poste <Landa Parad'>

Balkana kunlaboro

Konigo kaj subteno de la deko da landoj de la balkana regiono.

Tio starigas duan centron de forto, aldone al la tradiciaj movadaj landoj en Eŭropo

Tiu laboro bezonas kaj ricevas protokoladon, por stimuli plian agadon.

La fadeno

Informi, instigi kaj instruadi: Pri instruado kaj ILEI: EKO informas, AMO instigas.

Ĝenerale: EKO informas, AMO instigas, Landa Parad' prezentas la realon kaj Balkanio vastigas la terenojn de intensa agado en Eŭropo.

75



SMG en Pinehaven, 3-jara

SMG kun la patro kaj fratineto.



SMG survoje al New Plymouth. Aĝo ĉ. 8-jara. Kun mia frato en Nelson aĝo ĉ. 10-jara. Familio, SMG ĉ. 13-jara



SMG kun patro kaj fratino en Augsburg en 1958



SMG ĉe la kristnaska festa manĝo en Nov-Zelando en 2019.



SMG kun familio ĉ. 1992 en Budapeŝto.
SMG en Nov-Zelando en 2019 kun gefratoj,
SMG kiel vic-prezidanto de UEA.



smg/personal.

